# Invitilo al komuna programo de Esperantista klubo Brno kaj Esperantista klubo Gliwice

Ni kore invitas vin al sekva komuna programo de du esperantistaj kluboj.

Temo.

## Laŭ spuroj de menonitoj venintaj al la terenoj de Żuławy en la 16-a jc.

En Pollando, ĉefe en Żuławy kaj laŭlonge de la malsupraj partoj de la rivero Vistulo, kaj en aliaj regionoj de Pollando en 16-a jarcento loĝiĝis kamparanoj el Frisio kaj Flandrio, nomataj OLENDROJ. La olendroj ne integriĝis kun la ceteraj loĝantoj de Żuławy, vivante en siaj vilaĝoj laŭ la reguloj de sia religio. En granda parto ili estis menonitoj, kiuj elmigris pro la ekonomia situacio kaj persekutadoj en sia lando. Ili famiĝis pro siaj elstaraj kapabloj

pri terplibonigo, diligenteco kaj pacifismo. Post unua grupo de kamparanoj venis ankaŭ alte edukitaj personoj kiuj ekloĝis en tiama regiona centro de kulturo kaj ekonomio – urbo Gdańsk.

Ili vivis kaj laboris en Pollando dum kvar jarcentoj kaj ĝis nun en nia lando restis multaj spuroj de tiu religia malplimulto. La menonitoj en Pollando tute malaperis post fino de dua monmilito. Dum prelego Robert Kamiński prezenti iliajn ekterordinarajn atingojn kaj ĝis nun egzistantajn verkojn en Gdańsk kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

**Kiam:** la 11-an de februaro 2026 je **19.00** (UTC+1)

**Prelegonto**: Robert Kamiński (PL)

**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Zoom**

Jen la ligilo: https://polsl-pl.zoom.us/j/93116604802?pwd=MGJzQ0pmeklOMCtYamJUMlA0all2Zz09

Enirkodo: 931 1660 4802

Pasvorto: 235959.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

★

# Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz,

Aŭstrio

- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

★

# Cetara programo en februaro

La 18an **Rabistoj kaj banditoj** – Oldřich Arnošt Fischer, la klubejo

La 25an **Trampoj** – Vladimír Türk, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

★

# Programo en marto

La 4an **Jarkunveno de membroj**, la klubejo

La 11an **Universala kongreso en Graz** – Ewald Schick (AT), kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Prezento de instrumetodo** – Anton Oberndorfer (AT), la klubejo

la 25an **La edzino de la tempvojaĝanto** (komparo de la esperanta kaj la ĉeĥa tradukoj) – Mirka Tomečková, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

Pripensu jam, kiel vi povus kontribui al la programo. Tute mankas programo en la klubejo ekde aprilo kaj restas ankoraŭ liberaj kelkaj datoj por retaj renkontiĝoj. Ne hezitu proponi.

Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon

## Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY mailer lite